

# KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

[www.ueci.it](http://www.ueci.it)

*"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)*

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -  
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -  
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62  
Stampato da Centro Grafico Pirola-Lissone (MB)

Anno 100 - n.1 /2021  
gennaio/febbraio/  
marzo

## 100a DATREVENO DE KATOLIKA SENTO



*"... mi kredas, ke por ne perdiĝi ni devas spiri la veron de la bonaj historioj: rakontoj, kiuj edifas, ne detruas; rakontoj, kiuj helpu trovi la radikojn kaj la forton por iri kune antaŭen. En la konfuzo de la voĉoj kaj de la mesaĝoj, kiuj ĉirkaŭas nin, ni bezonas rakontadon homan, kiu parolu pri ni kaj pri la belo, kiu loĝas en ni.*

*Rakontado, kiu estu kapabla rigardi la mondon kaj la eventojn kun tenereco; kiu rakontu, ke ni estas parto de teksaĵo viva; kiu malkaŝu la interplekton de fadenoj, kun kiuj ni estas ligitaj unuj kun la aliaj".*

Mesaĝo de Papo Francesco por la 54a tago de la sociaj komunikadoj

*Kun humileco kaj kun multe da sindevigo, ĝi estas tio, kion multaj redaktoroj de nia revuo faris. Ĉiu paĝo estas ero de vivo, etapo, evoluo, ĉapitro de tiu ĉi nia belega historio (red.).*

*"... credo che per non smarrirci abbiamo bisogno di respirare la verità delle storie buone: storie che edificano, non che distruggano; storie che aiutino a ritrovare le radici e la forza per andare avanti insieme. Nella confusione delle voci e dei messaggi che ci circondano, abbiamo bisogno di una narrazione umana, che ci parli di noi e del bello che ci abita. Una narrazione che sappia guardare il mondo e gli eventi con tenerezza; che racconti il nostro essere parte di un tessuto vivo; che riveli l'intreccio dei fili coi quali siamo collegati gli uni agli altri".*

Messaggio di Papa Francesco per la 54 giornata delle comunicazioni sociali

*Con umiltà e tantissimo impegno è quello che tanti redattori della nostra rivista hanno fatto. Ogni pagina è un pezzo di vissuto, una tappa, un'evoluzione, un capitolo di questa nostra bellissima storia (red.).*

## Mesaĝo de Papo Francisko okaze de la virtuala soleno de la unua internacia tago de la homa frateco (4.2.2021)



### FRATECO ESTAS LA NOVA LANDLIMO DE LA HOMARO

Por la dua datreveno de la renkonto en Abu Dhabi, kie la 4-an de Februaro 2019 ili kune subskribis la dokumenton pri la Homa Frateco, Papo Francisko kaj la Granda Imamo de Universitato Al-Azhar (Kairo), Ahmad Al-Tayyeb, "kunsidis", ĉi-foje interrete, por la unua Internacia Tago de la Homa Frateco, starigita de Unuiĝintaj Nacioj la 21-an de Decembro 2020, koincide ĝuste kun la tago, en kiu okazis la historia subskribo.

Ĝi estis okazo ne nur por aŭskulti ilin, sed ankaŭ por prezenti la gajnintojn de la unua Premio Zayed, ankaŭ inspirita de la dokumento, kiun ĉi-jare oni aljuĝis al la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, António Guterres, kaj al Latifa Ibn Ziaten, patrino de kvin gefiloj, kiu post perdo de unu el ili, viktimo de terorismo, fondis asocion por juneco kaj paco, kiu havas lian nomon: Imad. Partoprenis ankaŭ juĝisto Mohamed Mahmoud Abdel Salam, ĝenerala sekretario de la Alta Komitato por la Homa Frateco, la organo, kiu, pere de internacia ĵurio, elektis la gajnintojn.

La unuaj vortoj de Papo Francisko estis por la

### LA FRATELLANZA È LA NUOVA FRONTIERA DELL'UMANITÀ

Per il secondo anniversario dell'incontro di Abu Dhabi, dove il 4 febbraio 2019 insieme firmarono il Documento sulla fratellanza umana, Papa Francesco e il grande Imam dell'università Al-Azhar (Il Cairo) Ahmad Al-Tayyeb si sono di nuovo "riuniti", questa volta sul web, per la prima Giornata internazionale sulla fratellanza umana, istituita il 21 dicembre 2020 dall'Onu, in coincidenza proprio con il giorno in cui avvenne la storica firma.

È stata l'occasione non solo per ascoltare loro, ma anche per presentare i vincitori del primo Premio Zayed, ispirato anch'esso al documento, che quest'anno va al segretario generale dell'Onu, António Guterres, e a Latifa Ibn Ziaten, una mamma di cinque figli, che dopo averne perso uno, vittima del terrorismo, ha fondato un'associazione per i giovani e la pace, che ha il suo nome: Imad. Ha partecipato anche il giudice Mohamed Mahmoud Abdel Salam, segretario generale dell'Alto Comitato per la fratellanza umana, l'organismo che tramite una giuria internazionale ha scelto i premiati.

Le prime parole di papa Francesco sono state

Imamo, «mia frato, mia amiko, mia kunulo en defioj kaj riskoj - li rimarkis - en la batalo por la frateco».

«Lia atesto – daŭrigis sekve la Papo - multe helpis min, ĉar ĝi estis kuraĝa atesto.

Mi scias, ke ĝi ne estis facila tasko. Sed kun vi ni povis fari tion kune, kaj helpi unu la alian. La plej bona afero estas, ke tiu unua deziro de frateco konsolidiĝis en aŭtentika frateco. Dankon, frato, dankon».

Poste Papo Bergoglio dankis ŝejkon Mohammed bin Zayed «pro ĉiuj klopodoj, kiujn li faris por daŭrigi ĉi tiun vojon. Li kredis je la projekto», li diris.

Kaj dankon la Papo diris ankaŭ al juĝisto Abdel Salam, «“l'enfant terrible” de la tuta projekto, amiko, laboranto, plena je ideoj, kiu helpis nin antaŭeniri».

Esprimoj de dankemo kaj amemo estis ankaŭ por Guterres kaj Latifa.

Videble feliĉa, Francisko redeklaris:

«Dankon al ĉiuj, ĉar vi vetis pri frateco, ĉar hodiaŭ la frateco estas la nova landlimo de la homaro. Aŭ ni estas fratoj aŭ ni detruas unu la alian».

Kaj pro tio li avertis kontraŭ indiferenteco: «Ni ne povas lavi niajn manojn per la malproksimeco, la nezorgemo, la malinteresiĝo. Aŭ ni estas fratoj aŭ ĉio kolapsas.

Ĝi estas la landimo. La landlimo, sur kiu ni devas konstrui; ĝi estas la defio de nia jarcento, ĝi estas la defio de nia tempo».

Ankaŭ la “nezorgemo”, fakte, estas por la Papo «tre subtila formo de malamikeco.

Ne necesas milito por krei malamikojn.

Sufiĉe kun nezorgemo. Sufiĉe kun ĉi tiu tekniko - ĝi fariĝis tekniko - sufiĉe kun ĉi tiu konduto rigardi alidirekten, ne zorgante pri la alia, kvazaŭ li ne ekzistus».

Bergoglio sekve klarigis, kion li volas diri per frateco. «Ĝi signifas etenditan manon;

per l'Imam, «fratello mio, amico mio, mio compagno di sfide e di rischi – ha rimarcato – nella lotta per la fratellanza». «La sua testimonianza – ha quindi proseguito il Pontefice – mi ha aiutato molto perché è stata una testimonianza coraggiosa. So che non era un compito facile. Ma con lei abbiamo potuto farlo insieme, e aiutarci reciprocamente. La cosa più bella è che quel primo desiderio di fratellanza si è consolidato in vera fratellanza. Grazie, fratello, grazie».

Successivamente papa Bergoglio ha ringraziato lo sceicco Mohammed bin Zayed «per tutti gli sforzi che ha compiuto perché si potesse procedere in questo cammino. Ha creduto nel progetto», ha detto.

E un grazie il Papa lo ha detto anche al giudice Abdel Salam, «“l'enfant terrible” di tutto questo progetto, amico, lavoratore, pieno d'idee, che ci ha aiutato ad andare avanti». Espressioni di gratitudine e di affetto anche per Guterres e Latifa.

Visibilmente contento, Francesco ha ribadito: «Grazie a tutti per aver scommesso sulla fratellanza, perché oggi la fratellanza è la nuova frontiera dell'umanità. O siamo fratelli o ci distogliamo a vicenda».

E per questo ha messo in guardia dall'indifferenza: «Non possiamo lavarvene le mani, con la distanza, con la non-curanza, col disinteresse. O siamo fratelli o crolla tutto.

È la frontiera. La frontiera sulla quale dobbiamo costruire; è la sfida del nostro secolo, è la sfida dei nostri tempi».

Anche la «non-curanza», infatti, è per il Papa «una forma molto sottile d'inimicizia. Non c'è bisogno di una guerra per fare dei nemici. Basta la non-curanza. Basta con questa tecnica – si è trasformata in una tecnica –, basta con questo atteggiamento di guardare dall'altra parte, non curandosi dell'altro, come se non esistesse».

Bergoglio ha quindi spiegato che cosa intende per fratellanza. «Vuol dire mano tesa;

frateco signifas respekton. Frateco signifas aŭskulti kun malfermita koro. Frateco signifas firmecon en la propraj konvinkoj. Ĉar ne ekzistas aŭtentika frateco, se oni prinegocas siajn konvinkojn».

Kaj ni, la aldonis la Papo - estas fratoj, naskitaj de la sama Patro. Kun malsamaj kulturoj, tradicioj, sed ĉiuj fratoj.

Kaj en la respekto de niaj diversaj kulturoj kaj tradicioj, niaj diversaj civitanecoj, necesas konstrui ĉi tiun fratecon».

Ĉar «mondo sen fratoj estas mondo de malamikoj».

fratellanza vuol dire rispetto. Fratellanza vuol dire ascoltare con il cuore aperto. Fratellanza vuol dire fermezza nelle proprie convinzioni. Perché non c'è vera fratellanza se si negoziano le proprie convinzioni». E noi, ha aggiunto il Pontefice, «siamo fratelli, nati da uno stesso Padre. Con culture, tradizioni diverse, ma tutti fratelli.

E nel rispetto delle nostre culture e tradizioni diverse, delle nostre cittadinanze diverse, bisogna costruire questa fratellanza».

Perché «un mondo senza fratelli è un mondo di nemici».

**Carlo Sarandrea**



freepik.com

**Quest'anno ci sarà l'elezione del nuovo Comitato Centrale.**

**Sollecitiamo le candidature: chiunque sia disponibile ad offrire un po' del suo tempo o delle sue competenze per collaborare nella gestione dell'UECI si proponga; basta segnalarlo quanto prima al presidente o a uno dei consiglieri uscenti.**

**Le condizioni stabilite dallo statuto sono: aver compiuto i 16 anni di età ed essere iscritto all'UECI nel 2020 e 2021.**



*La lumo de la Resurektinta Kristo  
donu ĝojn al niaj koroj  
Bonan Paskon*





## LA BELECO DE LA KREDO

*"Guardiamo il Crocifisso e apriamo il Vangelo, sarà per noi come una grande liturgia domestica" Papa Francesco 2020*

*"Ni rigardu la Krucon kaj malfermu la Evangelion, ĝi estos por ni kiel granda hejma liturgio" Papo Francisko 2020*



***Il crocifisso "schiodato" (Salerno, Parrocchia di S. Domenico)  
La "malnajlita" krucumito (Salerno, Paroĥo de sankta Dominiko)***

La **moveblaj krucifiksoj** disvastiĝis tra la tuta Eŭropo, inter la oka kaj dekunua jarcentoj. Luj korpopartoj kiel kolo, lango, okuloj kaj membroj, estis moveblaj.

Ili permesis pli grandan realismon dum la prezentadoj de la tragikaj eventoj de la sankta semajno.

La moveblaj brakoj, ekzemple, permesis al Kristo esti malnajlita, kuŝigita sur portlito kaj fermita en la Sankta Tombo.

Foje Kristo havis moveblan basenon ĉar dum la rito de "Planctus Mariae" (la lamentadoj de Maria), la skulptaĵo devis kuŝi inter la brakoj de la virino, kiu personigis Maria'n.

I **crocifissi mobili** si diffusero in tutta Europa e nei secoli X e XI. Alcune parti del corpo, come il collo, la lingua, gli occhi e gli arti, erano mobili.

Essi permettevano un maggiore realismo nelle rappresentazioni dei drammi della settimana Santa.

Le braccia mobili, per esempio, permettevano di schiodare il Cristo, di adagiarlo su una lettiga e di chiuderlo nel Sepolcro.

A volte il Cristo aveva il bacino mobile perché, durante il rito del "Planctus Mariae" (Lamentazioni di Maria), la scultura doveva giacere tra le braccia di una donna che rappresentava Maria.

Unu el la plej famaj estas la kruco de Döebel datita komence de la dekseca jarcento.

Li havis moveblajn brakojn, la kolon fiksitan per du feraj hokoj, kiuj povis fali en la momento de la morto, hararon, barbon faritan per malhela ĉeval-hararo kaj mekanismon, kiu permesis al la statuo verŝi sangon miksitajn kun akvo kiam la centuriestro trafis la lignan flankon de la krucumito per sia lanco.

Nuntempe en iuj partoj de Italio ankoraŭ okazas tiu-ĉi malnova tradicio.

En la preĝejo de "Sankta Domenico kaj de Sankta Maria de la pordo" en Salerno estas konservata malnajlita Kristo. La verko, farita per papermaĉaĵo, konsistas el krucumito sur ligna kruco de la deknaŭa jarcento.

La krucumito havas la apartaĵon havi ŝultrojn moveblaj per zigzage faldita ilo.

Uno dei più famosi è il crocifisso di Döbel degli inizi del XVI secolo.

Aveva le braccia mobili, il collo fissato con due occhielli di ferro che potevano cadere nel momento della morte, capelli, barba in crine scuro di cavallo e un meccanismo che permetteva di far versare alla statua "sangue misto ad acqua" nel momento in cui il centurione colpiva con la sua lancia il costato ligneo del crocifisso.

Ancora oggi in alcune parti d'Italia si svolge questa Antica Tradizione.

Nella chiesa di "San Domenico e Santa Maria della porta" a Salerno è conservato un Cristo schiodato. L'opera è un crocifisso di cartapesta su una croce lignea del XIX secolo.

Il crocifisso ha la particolarità di avere il Cristo con le spalle mobili ottenute per mezzo di un meccanismo a soffietto

*esperantigis N.Cescotti*

*T.F*



lapetiteprune.com

## NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Nia membro Prof. Giuseppe Venturini forpasis la 3-an de Februaro. Dum sia longa vivo, li mortis 95-jara, li estis ano de UECl dum senombraj jaroj engaĝigante ĉe la grupo de Treviso. Lia alia pasio estis la historiografio de Mogliano



Il 3 febbraio ci ha lasciati il nostro socio Prof. Giuseppe Venturini. Durante la sua lunga vita, aveva 95 anni, è stato membro di UECl da innumerevoli anni impegnandosi col gruppo di Treviso. L'altra sua passione fu la storiografia di

Veneto, kie li loĝis.

Li verkis multajn librojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas la fundamento por la kono de la historio de tiu urbo.

En la jaro 2016, pro ĉi tiu sindevigo, li estis premiita per memortabulo de la urba administracio. Nia komunumo kondolencas al la familio en la certeco ke, kiam finiĝas la surteraj tagoj, tio, kio estis farita, pluvivas.

Mogliano Veneto dove abitava.

Scrisse molti libri che ancora oggi sono il fondamento per il recupero della storia della sua città.

Per questo impegno nel 2016 fu premiato con una targa commemorativa dall'Amministrazione comunale. La nostra comunità porge alla famiglia le condoglianze nella certezza che, quando i giorni terreni finiscono, sopravvive ciò che si è fatto.

## SCIIGOJ EL ESPERANTA MONDO



### LA SEKRETO DE NORMA POR RESTI ĈIAM AKTIVAJ

*6.081.000 spektantoj de la itala televidjurnalo TG1 povis ekkoni la agadon en la virtuala mondo de nia 94-jaraĝa membrino Norma Cescotti Covelli. Uzi interreton kaj lerni Esperanton por resti aktivaj grandaĝe, estis ŝia mesaĝo. Jen la transskribo de la intervjuo elsendita vespere de la 24-a de Novembro 2020.*

En tempo de pandemio nur Interreto ebligis plenumi diversajn agadojn. Ĝi estas la kazo de 94-jarulino de Trento, kiu konformiĝis por daŭre instrui interrete Esperanton, la universalan lingvon. (Nia senditino, Roberta Ferrari).

**Ĝuste la tempo por trinki kafon kaj Norma pretas kunligi kun siaj studentoj por la ĉiutaga leciono de Esperanto.**

*Norma: Do, mi...*

### IL SEGRETO DI NORMA PER RESTARE SEMPRE ATTIVI

*6.081.000 spettatori del TG1 hanno potuto conoscere l'attività nel mondo virtuale della nostra iscritta 94enne Norma Cescotti Covelli. Usare Internet e imparare l'esperanto per rimanere attivi in alta età, è stato il suo messaggio. Pubblichiamo la trascrizione dell'intervista, andata in onda il 24 novembre 2020.*

In tempo di pandemia solo Internet ha permesso di svolgere molte attività: è il caso di una 94enne, trentina, che si adattata per continuare ad insegnare on line l'esperanto, la lingua universale. (L'inviata: Roberta Ferrari.)

**Il tempo di prendere un caffè e Norma è pronta a connettersi con i suoi studenti per la quotidiana lezione di esperanto.**

*Norma: Allora, mi...*

**94-jaraĝa, du filoj, 4 nepoj: nun, kiam Norma pasas multe da tempo hejme, sola, konektiĝi kun Interreto fariĝis kutimo.**

*Norma:* Aparte hodiaŭ, ĉar se mi ne havus la komputilon kaj ĉi tion.. (*ŝi indikas la saĝtelefonon*). Ni komencu! Ĉu ni komencas? Eltiru ĉi tiun paĝon. Vi, la lastan parton, ĉi tie: vi rolas kiel Eva kaj vi kiel Paŭlo. Faru ĉi tiun dialogon.

*Studentino:* "Ni devas manĝi en nia kuirrejo".

**La leciono daŭras: Norma kapablas ankaŭ esti rigora instruistino...**

*Norma:* Atentu, vi!

**Kiom aĝa vi estis kiam vi eklernis Esperanton?**

*Norma:* jes, mi estis sepdekjarulino, iom tia. Kaj mi aktivis furore, efektive, ĉar mi ŝatis ĝin.

**Je la fino de la leciono Norma salutas ĉiujn.**

*Norma:* ĝis, knaboj, ĝis (*voĉo ekstera: dankon!*)

**Resti kunligitaj pere de Interreto, pere de ĉi tiu sistemo, signifas iamaniere...**

*Norma:* Ĝi signifas daŭre vivi... "Sed mi, al mi plaĉas la krucvort-enigmoj... Mi spektas televidon... Mi ĉi tiel... (tio) sufiĉas al mi". Ne! Tio ne sufiĉas, knabinoj! Nu, vekigu, aktivu, ĉar la cerbo, laŭ mi, estas kiel la korpo: se vi ne gimnastikas, ĝi endormiĝas kaj...

**Per guardare l'intervista:**

**Por spekti la intervjuon:**

<https://www.youtube.com/watch?v=trJz600ip8M>

**94 anni, due figli, 4 nipoti: ora che Norma passa molto tempo a casa da sola connettersi ad internet è diventata un'abitudine.**

*Norma:* specialmente oggi, perché io se non avessi il computer e questo qui... (*indica lo smartphone*). Cominciamo! Iniziamo? Pigliatevi fuori sta pagina. Tu, l'ultima parte, qua: tu fai Eva e tu fai Paolo. Fate questo dialogo.

*Studentessa:* "Ni devas manĝi en nia kuirrejo".

**La lezione va avanti. Norma sa anche essere un'insegnante severa...**

*Norma:* Attenti voi!

**Quanti anni aveva quando ha imparato l'esperanto?**

*Norma:* sì, ero sulla settantina, una cosa così. E ho fatto furore effettivamente, perché mi piaceva.

**A fine lezione Norma saluta tutti:**

*Norma:* ciao ragazzi, ciao (*voce fuori campo: grazie!*)

**Rimanere connessi a Internet attraverso questo sistema significa in qualche modo...**

*Norma:* ...significa continuare a vivere. "Ma io, a me piace fare le parole crociate... lo guardo la televisione... lo qua... mi basta". No, non vi basta ragazze! Deh, svegliatevi, datevi da fare, perché il cervello per conto mio è come il corpo: se voi non gli fate far ginnastica, lui si addormenta e...



## NI GRATULAS KAJ BONDEZIRAS

La 3-an de Februaro nia eksa prezidanto Serio Boschin fariĝis 90-jara.

*"La jaroj estas sumo de feliĉaj kaj malĝojaj momentoj, de ridetoj kaj doloroj, de pasioj kaj emocioj. Ni bondeziras, ke vi havu la forton, ankoraŭ dum multaj jaroj, por vin dediĉi al la pasio, kiu inspiris vin dum ĉi tiuj jaroj. Esperanto bezonas homojn pasiajn kiel vi. "*



Il 3 febbraio 2021 Il nostro ex presidente Serio Boschin ha compiuto 90 anni.

*"Gli anni sono una somma di momenti felici e tristi, di sorrisi e dolori, di passioni ed emozioni.*

*Ti auguriamo di avere ancora per tanti anni la forza di coltivare la passione che ti ha animato in*

*tutti questi anni.*

*L'esperanto ha bisogno di uomini appassionati come te."*



La 7-an de Novembro 2020 Luigi Fraccaroli estis elektita prezidanto de FEI por la trijara periodo 2020/2023.

Bonan laboron ni bondeziras al li kaj al ĉiuj konsilianoj, kiuj, ni estas certaj, laboros pasie kaj entuziasme por kreskigi la italan esperantan movadon kaj por antaŭenigi la valorojn, je kiuj ni esperantistoj kredas.



Il 7 novembre 2020 Luigi Fraccaroli è stato eletto presidente della Fei per il triennio 2020/2023.

Auguriamo buon lavoro a lui e a tutti i consiglieri che, siamo certi, lavoreranno con passione ed entusiasmo per far crescere il movimento esperantista italiano e promuovere i valori in cui noi esperantisti crediamo.



### KUNPREĜADO DE ROZARIO



Ĉiujn merkredojn kaj la unuan tagon de ĉiuj monatoj okazis kaj okazos la kunpreĝado de rozario ĉe ZOOM organizita de IKUE. Dum la semajno por la Unueco de la kristanoj, aro de katolikaj kaj protestantaj kristanoj preĝis kaj meditadis kune. Dum la karesmo IKUE-anoj renkontiĝis ĉiujn merkredojn por trapreĝi la Sanktan Krucvojon.



[lapetiteprune.com](http://lapetiteprune.com)

## KARESMO 2021 LA KRUCVOJO



## NIA ETA PARNASO

### DONAMI, SIGNORE

La pazienza del contadino,  
che soffre la grandine  
sulle neonate gemme:  
sa che nessuna danza aprirebbe il  
sereno.

La forza del muratore,  
che abbatte muri ammuffiti  
e costruisce la sua casa al sole:  
sa che maestro della fatica è il su-  
dore.

L'umiltà del saggio,  
che è contadino e muratore:  
perché sa lottare,  
a seconda del tempo.

### DONU AL MI SINJORO

La paciencon de la Kamparano  
kiu suferas hajlon  
sur la novnaskitaj burĝonoj  
li scias ke neniu danco malfermos  
la sennuban veteron.

La forton de la masonisto,  
kiu faligas ŝimajn murojn  
kaj konstruas sian domon en la  
suno:  
li scias ke majstro pri laboro-peno  
estas ŝvito.

La humilecon de la saĝulo  
Kiu estas kamparano kaj masoni-  
sto,  
ĉar li scias batali,  
depende de la momento.

**Rita Julianis**

*(esperantigis A. Iannacone)*

Rita Julianis naskiĝis kaj loĝas  
en Tora e Piccilli, urbeto de la  
norda Casertano. Ŝi instruas hi-  
storion ĉe la Lernejo " Gu-  
glielmo Marconi" en Vairano  
Scalo (CE). Ŝi eldonis la jenajn  
kolektojn de poemoj:  
-Rulŝtoneto, Ed. Eva  
-Mara senso, Ed. Eva  
-Ordinara magio, Ed. Eva  
-Papiloj kaj vespertoj, Ed. Eva  
-Somera solstico, Ed. Eva



Rita Julianis è nata e vive a Tora e  
Piccilli, un paesino dell'alto Caser-  
tano. Insegna Italiano e Storia  
nell'I.S.I.S. "Guglielmo Marconi"  
di Vairano Scalo (CE).  
Ha pubblicato finora le seguenti  
raccolte di poesie:  
-Ciottoli, Ed. Eva  
-Il senso del mare, Ed. Eva.  
-Ordinaria magia Ed. Eva.  
-Farfalle e pipistrelli, Ed. Eva.  
-Solstizio d'Estate, Ed. Eva.  
<http://edizionieva.com>

## PAROLU AL MI EN VIA LINGVO



Augustin Kakozwa estas esperantisto konata de ni antaŭ multe da tempo. Li fondis la bonfaran organizon “Asocio Nova Familio”, kiu agas en la urbo Goma, en la Demokratia Respubliko Kongo. Ĝia celo estas prizorgi infanojn, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la inter-civitana milito en la lando. Ĝi estis fondita antaŭ kelkaj jaroj fare de lokaj aktivuloj de la Esperanto-movado. Li allasis intervjuon, kies ni publikigas parton.

**(...) Kaj kia estas la lernejo, al kiu vi pagas por studado de viaj edukatoj? Ĉu ĝi estas ŝtata aŭ privata kaj kion oni studas tie?**

Ĉi-jare ni subtenas la lernadon de 110 georfoj, el kiuj 65 frekventas bazajn lernejojn, 40 mezlernejojn kaj 5 universitatojn (...).

Por plimulto el ili ni sukcesis aranĝi lernadon en privataj lernejoj, kie oni instruas bonkvalite kaj en bonaj kondiĉoj.

Parto de ili tamen devas lerni en lernejoj ŝtataj, kie ili renkontas multajn problemojn: pro manko de financoj oni amasigas ĝis 100 homojn en sama ĉambro kaj ne malofte

Augustin Kakozwa è un esperantista a noi noto da molto tempo. Ha fondato l'associazione benefica New Family Association, che opera nella città di Goma nella Repubblica Democratica del Congo.

Il suo scopo è prendersi cura dei bambini che hanno perso i genitori a causa della guerra civile nel paese. È stata fondata alcuni anni fa da attivisti locali del movimento esperanto. Augustin ha concesso un'intervista, di cui pubblichiamo una parte.

**(...) E com'è la scuola che tu paghi per far studiare i tuoi studenti? È statale o privata e cosa si studia lì?**

Quest'anno sosteniamo l'apprendimento di 110 orfani, di cui 65 frequentano scuole elementari, 40 scuole superiori e 5 l'università (...)

Per la maggior parte di loro siamo riusciti a organizzare l'apprendimento in scuole private dove l'insegnamento è qualitativamente buono e avviene in buone condizioni. Alcuni di loro, però, devono studiare nelle scuole statali, dove affrontano molti problemi: per mancanza di fondi, fino a 100 persone si riuniscono nella stessa stanza e non è raro che

okazas strikoj de instruistoj pro tio, ke oni prokrastas pagadon de iliaj salajroj.

Studobjektoj, kiujn oni instruas al ili, estas la kutimaj: matematiko, geografio, historio k.t.p. Koncerne lingvojn ili studas la francan, kiu estas oficiala lingvo en nia lando, la anglan kaj ankaŭ la svahilan, kiu estas ilia gepatra lingvo kaj ankaŭ servas por intergenta komunikado en granda parto de Orienta kaj Centra Afriko.

### **Pro kio vi instruas lingvon Esperanto al viaj edukatoj? Kian celon vi strebas atingi per tio?**

Ĝenerale, ni celas per tio doni al ili «nematerian kapitalon», kiu, kiel ni esperas, povos helpi ilin en iliaj vivoj. Unua celo de la instruado de esperanto estas krei bazon por pli sukcesa lernado de aliaj lingvoj, kiujn ili bezonos. Kiel mi menciis supre, la svahila estas la gepatra lingvo de niaj edukatoj kaj ili parolas ĝin en ĉiutaga vivo; nur en la lernejo ili renkontiĝas kun la franca kaj la angla.

Estas bone konate, ke oni lernas fremdan lingvon pli facile, se antaŭ tio oni jam ekkonis alian. Esperanto havas logikan kaj bone kompreneblan strukturon, multaj radikoj en ĝi estas komunaj kun la franca kaj la angla lingvoj; do la lernado de ĝi preparas niajn edukatojn al pli sukcesa ekposedo de tiuj.

Krome, la komunumo de esperanto parolantoj nombras centmilojn da homoj en multaj landoj. La kono de la lingvo ebligas al la edukatoj komuniki kun ĝiaj anoj kaj establi sociajn kontaktojn, kiuj povos montriĝi utilaj por iliaj laboroj kaj aliaj aferoj.

(...) Kompreneble ni ankaŭ planas daŭrigi la instruadon de esperanto. Dank' al donacota projekciilo ni povos montri al la lernantoj filmojn kaj videojn en Esperanto sur granda ekrano.

insegnanti scioperino a causa dei ritardi dei salari.

Le materie che vengono insegnate sono le solite: matematica, geografia, storia e così via. Per quanto riguarda le lingue, studiano il francese, che è la lingua ufficiale nel nostro paese, l'inglese e anche lo swahili, che è la loro lingua madre e serve anche per la comunicazione interetnica in gran parte dell'Africa orientale e centrale.

### **Perché insegni l'esperanto ai tuoi studenti? Quale obiettivo ti sforzi di raggiungere attraverso questo?**

In generale, miriamo a dare loro un "capitale immateriale" che, come speriamo, possa aiutarli nella loro vita. Il primo obiettivo dell'insegnamento dell'esperanto è creare una base per un apprendimento più efficace di altre lingue di cui avranno bisogno. Come ho già detto, lo swahili è la lingua madre dei nostri alunni e lo parlano nella vita di tutti i giorni; solo a scuola incontrano il francese e l'inglese. È risaputo che è più facile imparare una lingua straniera se ne hai già incontrata un'altra. L'esperanto ha una struttura logica e comprensibile, molte radici sono comuni al francese e all'inglese; così l'apprendimento prepara i nostri alunni per una migliore acquisizione di quelle lingue.

Inoltre, la comunità di lingua esperanto conta centinaia di migliaia di persone in molti paesi. La conoscenza della lingua consentirà agli alunni di comunicare con i propri membri e stabilire contatti sociali che potranno rivelarsi utili per il proprio lavoro e altre cose.

(...) Naturalmente, abbiamo anche in programma di continuare ad insegnare l'esperanto. Grazie a un proiettore che ci è stato donato, potremo mostrare agli studenti film e video in esperanto su un grande schermo.

*sendis pastro Gustavo Zanoli*

<https://www.facebook.com/AsocioNovaFamilio/>



## KREDO kaj SOCIETO



Bottega Fassana - La riĉulo kaj la malriĉulo

### Solidareco, bazo de la respondeco

La solidareco estas la ligo, kiu kunigas la homojn. Ĝi dependas de la koncepto, kiun oni havas pri la homoj kaj pri la socio. Ekzistas vido laika de la solidareco kaj ekzistas vido religia.

Ambaŭ vidoj konverĝas en la konsidero de la socio ene de "sistema" perspektivo, en kiu validas interdependeco kaj komplementeco inter la membroj de la socia korpo.

Malsama estas la kultura radiko, kiu inspiras tiun ĉi vidon. En la laika vido la "gluaĵo" venas el la bezono kaj do el la profito, kiel substrekas la sociologo Giovanni Sarpellon:

"Ĉiuj bezonas la aliajn kaj la respondeca solidareco reprezentas la ununuran racion alternativon por transpasi la "ne-memsufiĉon" de la unuopaj individuoj".

En la kristana vido la solidareco havas je la bazo eventon de fido: la enkarniĝo de la Filo de Dio, kiu kunigis al si, en nerompebla maniero, ĉiujn homojn, farante el ili ununuran korpon.

### Solidarietà, base della responsabilità

La solidarietà è il legame che tiene insieme le persone. Essa dipende dalla concezione che si ha della persona e della società. Esiste una visione laica di solidarietà e una visione religiosa.

Ambedue convergono nel considerare la società in una prospettiva 'organica', nella quale vige una interdipendenza e una complementarietà tra le membra del corpo sociale.

Differente è la radice culturale che ispira questa visione. Nella visione laica il "collante" è dato dal bisogno e quindi dalla convenienza, come sottolinea il sociologo Giovanni Sarpellon: «Ciascuno ha bisogno degli altri e la solidarietà responsabile rappresenta l'unica alternativa razionale per superare la 'non-autosufficienza' dei singoli individui» Nella visione cristiana la solidarietà ha alla base un evento di fede: l'incarnazione del Figlio di Dio, che ha unito a sé, indissolubilmente, tutte le persone, facendone un solo corpo.



Ĉiu ano estas ĝuanto de la kontribuo de la aliaj kaj estas, siavice, ŝuldanto al la aliaj. Jesuo konsideras kiel faritan al si mem ĉiun bonan geston rilatan al la gefratoj, kiel ankaŭ ĉiun rifuzon helpi.

Aspekto, kiu evidentigas la respondecon estas la kristana koncepto de "donaco". La donacoj, kiujn ni ricevas de la Sinjoro - ĉiuj donacoj, el la sano ĝis la fido kaj la graco... - restas lia propraĵo.

Ni estas nur administrantoj de ili kaj ni devas uzi ilin laŭ lia volo.

La donacoj estas donataj al la unuopaj homoj, sed kiel partoj de la sama korpo, kiel anoj de ununura familio.

Sekve, ili devas utili al ni mem, sed ankaŭ al la aliaj. Se nia frato malsatas kaj ni disponas je abunda manĝaĵo, ni devas kunpartigi ĝin kun li.

Ni estas respondecaj pri lia malsato.

La Eklezio ne estas insulo, sed estas viva parto de la homaro; ĝi ne ekzistas por si mem, sed por la mondo.

Ĝi estas en daŭra stato de misio kaj havas la devon disvastigi la evangeliajn valorojn de frateco, de solidareco, de egaleco, de justeco.

Ogni membro è fruitore dell'apporto degli altri ed è, a sua volta, debitore verso gli altri. Gesù considera fatto a sé stesso ogni gesto di buono rivolto ai fratelli, come pure ogni rifiuto di aiuto.

Un particolare che accentua la responsabilità è la concezione cristiana di "dono". I doni che riceviamo dal Signore - tutti i doni, dalla salute alla fede, alla grazia... - restano sua proprietà.

Noi ne siamo solo amministratori e dobbiamo usarli secondo la sua volontà.

I doni vengono dati alle singole persone, ma come componenti di un medesimo corpo, come membri di un'unica famiglia.

Di conseguenza devono servire a noi stessi, ma anche agli altri. Se nostro fratello ha fame e noi disponiamo di cibo in abbondanza, dobbiamo dividerlo con lui.

Siamo responsabili della sua fame. La Chiesa non è un'isola, ma è parte viva dell'umanità; non è per se stessa, ma è per il mondo.

È in continuo stato di missione e ha il dovere di diffondere i valori evangelici della fraternità, della solidarietà, dell'uguaglianza, della giustizia.

(esperantigis F.Fagnani)

**Don Salvatore Rinaldi**

<https://www.sangiovanivenafro.it/2019/11/11/solidarietà-base-della-responsabilità/>



### PRAA IRLANDA PREĜO

Dio ĉiam donu al vi  
sunradion por varmigi vin,  
lumradion por sorĉi vin,  
protektantan anĝelon,  
por ke nenio povu vundi vin.  
Ridon, kiu feliĉigos vin  
providencajn amikojn proksime al vi  
kaj, kiam vi preĝas  
ke la ĉielo aŭskultu vin.



### UN'ANTICA PREGHIERA IRLANDESE

Che dio ti conceda sempre  
un raggio di sole per scaldarti,  
un raggio di luna per incantarti,  
un angelo protettore  
così che niente ti possa far male.  
Una risata che ti rallegri.  
Amici provvidenziali vicino a te.  
E quando preghi,  
che il cielo ti ascolti.

sendis **Francesco Ottino**

## AMUZE *(Zorge de Giovanni Gazzola)*

Tre maljuna sinjoro estas en lito ĉe mortohoro. Lia fidela edzino sidas apud li kaj gardas lin. Per flustro:

- Maria, ĉu vi memoras kiam, post la eksplodo de la unua mondmilito, mi estis sendita al la fronto, kaj vi estis apud mi?

- Jes kara ... jes!

- ... kaj kiam mi vundiĝis kaj mi estis en milita hospitalo dum kvar jaroj kaj vi estis apud mi, Maria?

- Certe, karulo!

- Kaj ĉu vi memoras, kiam post la eksplodo de la dua mondmilito mi estis sendita al la fronto kaj vi estis apud mi?

- He, kiel mi ne memoru tion!...

- ... kaj kiam mi estis en koncentrejo kaj post ses jaroj mi estis liberigita? Ankaŭ tiam vi estis apud mi, Maria!

- Jes!

- Kaj ankaŭ nun, kiam mi estas mortanta, vi ĉiam estas apud mi Maria ...

- Ĉiam ...

- Ah Maria ...

- Diru al mi ...

- Ĉu eble vi alportis misfortunon al mi?

-----

Maljunulo iras al la kuracisto ĉar doloras lia maldekstra kruro.

- Vi havas nenion seriozan, via kruro doloras pro aĝo.

- Tio ne estas vere - la maljunulo respondas - mia dekstra kruro havas la saman aĝon kaj ĝi ne doloras!

-----

Luigino iras al sia avino kaj kunportas amikon. Babilante kun la avino, lia amiko akceptas la kafon, kiun la avino proponis al li, kaj krakmanĝas iujn arakidojn, kiuj estas en subtasoj sur la tablo.

Foririnte, la amiko de Luigino salutas la maljunulon:

- Dankon pro ĉio, precipe pro la arakidoj. Mi vere manĝis ilin ĝis supersatiĝo!!!

La avino: Sed imagu! Bedaŭrinde, de kiam mi ne plu havas miajn dentojn, mi povas nur suĉi la nuksan ĉokoladon kaj ĉiam restas al mi la arakidoj ...

Un signore molto anziano è nel letto in punto di morte. La fedele moglie è seduta al suo fianco e lo veglia. Con un filo di voce:

- Maria, ti ricordi quando, scoppiata la prima guerra mondiale, sono stato mandato al fronte, e tu eri accanto a me?

- Sì caro... sì!

- ... e quando sono rimasto ferito e sono stato quattro anni nell'ospedale militare e tu eri accanto a me, Maria?

- Certo caro!

- E ti ricordi quando, scoppiata la seconda guerra mondiale, mi hanno richiamato al fronte e tu eri accanto a me?

- Come non lo ricordo...

- ... e quando sono stato nel campo di concentramento e dopo sei anni sono stato liberato? Anche allora tu eri accanto a me, Maria!

- Sì!

- E anche adesso che sto morendo, tu sei sempre accanto a me Maria...

- Sempre...

- Ah Maria...

- Dimmi...

- Ma non è che mi hai portato sfortuna?.

-----

Un anziano va dal medico perché gli fa male la gamba sinistra.

- Lei non ha niente di grave, la gamba le fa male a causa dell'età.

- Non è vero- risponde l'anziano- la gamba destra ha la stessa età e non mi fa male!

-----

Luigino va da sua nonna e porta con sé un amico. Mentre lui chiacchiera con la nonna, l'amico accetta il caffè che la nonna gli ha offerto e sgranocchia delle noccioline che sono in un piattino sul tavolo.

Al momento di andarsene, l'amico di Luigino saluta l'anziana donna:

- Grazie di tutto, soprattutto per le noccioline. Ne ho fatto davvero una scorpacciata!!!

La nonna: - Ma figurati! Purtroppo, da quando non ho più i denti riesco solo a succhiare il cioccolato e mi avanzano sempre le noccioline ...

**COMITATO CENTRALE U.E.C.I.**

Presidente: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942  
e-mail : katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Francesco FAGNANI, Via Bartolomeo Eustachi 47, 20129 Milano

Segret./Cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Convento del SS.Redentore Piazza S. Francesco, 1  
Pergine Valsugana (TN)

Responsabile dei congressi: G.CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) - tel. 02.66301958

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, via Santa Bernadette 6, 00167 Roma

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel.  
3492191838

Consigliere: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consigliere: Giovanni GAZZOLA: Via Cendrole, 32 - Spineda, 31039 Riese Pio X (TV)

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECL.

**NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2021**

Associato ordinario con Katolika Sento (SO) . . . . .	€ 22,00
Associato giovane con Katolika Sento (SG) . . . . .	€ 11,00
Associato familiare senza Katolika Sento (SF) . . . . .	€ 11,00
Associato ordinario con Espero Katolika (SOE) . . . . .	€ 43,00
Associato sostenitore senza Espero Katolika SS) . . . . .	€ 44,00
Associato sostenitore con Espero Katolika (SSE) . . . . .	€ 65,00 *
Offerta minima per Katolika Sento (AK) . . . . .	€ 10,00
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE) . . . . .	€ 21,00

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato.

Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono € 2,10 per l'associato ordinario e € 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I. codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

**L'unica pubblicità con cui si finanzia Katolika Sento è il vostro amore**  
Abbonarsi e sostenere con offerte è il modo migliore per diffondere  
un ideale – (katolika sento 1987)